


Sennaciulo



Nia dosiero

LAIKECO



Sennaciulo, marto 2007, n° 3 (1221), MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €

Turisma parto de nia kongreso kaj kelkaj informoj




La ekskurso D7 estas nuligita

Tiuj, kiuj emos viziti senaton, do devos tion fari lunde, dum ekskurso D4. La OKK individue kontaktos ĉiujn, kiuj jam mendis la ekskurson D7 por solvi la problemon.

Infankongreso estas antaŭvidita

Ĝin prizorgos k-ino E. Barbey, kiu jam organizis du internaciajn infanrenkontiĝojn en Grezijono. Kamaradoj kun junaj infanoj do ne hezitu veni kun tuta familio.



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo
kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta,
FR-75020 Paris,
tel. +33.1.47.97.87.05,
telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Free: 09.50.71.01.97

Retadreso: satesperanto@free.fr.
TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-
15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-
16h30. Ekster la labor-horoj funkcias
aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Pa-
ris.

IBAN: FR 77 30041 00001
0123422K020 39

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: **satx-s**

Redaktas: Redakta Komitato - Cyril
Orsingher, Tonyo Del Barrio, Viola
Ando Murasaki, Djémil Kessous,
Petro Levi, Jacques Bannier, Vinko
Markov kaj Vito Markov.

Ĉefredaktoro: Cyril Orsingher
Enpaĝigisto: Kreŝimir Barković
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de
la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respon-
decas la aŭtoroj mem. Ricevitajn
manuskriptojn oni ne resend. La
limdato de ricevo de manuskriptoj
estas la 10-a de kuranta monato.



Imprimé par: TROISA, 4 rue Théo-
dule Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication:

Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono

France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj: peti la
tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-
Centro.

Dépot légal à la date de parution.

N° CPPAP 0510 G 86567

Limdato por ricevo de kontribuajfoj
estas ĉiam la 10-a en la monato.



Informoj al kaj pri la SAT-anaro

El la SAT-rondoj

La 4an de marto aperis la 30-a numero de la « Solidareco », la reta gazeto de niaj kamaradoj el Suda Koreio. Legu ĝin ĉe: <http://solidareco.cafe24.com/>

La Pariza Grupo de SAT-Amikaro organizis debaton malfermita al la ekstera publiko pri la lingvopolitiko de Francio en Afriko. La debaton enkondukis Ĝilalio Benamrano (Djilali Benamrane), ekonomikisto, kiu plurfoje partoprenis en disvolv-misioj en Afriko, kaj krome aktivas en la asocio « Survie », por ĉesigo de la prirabado de Afriko fare de Francio. La aranĝo estis aparte sukcesa. Ni ne nur estis 15, sed la enkondukanto montriĝis vere preta plu kunlabori kun ni (li finis sian prezenton per la demando: kiel mi, kiu estas en kontakto kadre de UNO-projektoj kun subvenciantoj, povus helpi al la disvastigo de Esperanto en Afriko?). Indus ne preterlasi tiun okazon. Do, ĉiuj kiuj havas ideojn aŭ informojn pri projektoj, kiuj povus esti finance subtenataj, ne hezitu esprimiĝi. Pliaj detaloj pri la vivo de la pariza grupo ĉe: <http://www.esperanto-sat.info/rubrique55.html>

Ĝeneralaj informoj

Nova rubriko, titolita « Kion fari? », estas enkondukita en la SAT-retejo. Tie estas listigitaj ĉiuj plu farotaj taskoj, jam anoncitaj en Sulo, ĝis ilia plenumiĝo. <http://www.satesperanto.org/-Kion-fari.html>

El la cetera laborista movado

La estremadura federacio de la hispana liberecana sindikato CNT presigis poŝkalendareton, sur kiu la monatonomoj aperas esperante. Kelkaj ekzempleroj estas haveblaj en la SAT-sidejo.

Helpe de la tradukoforto de la Aŭstria Esperanto-Federacio, la aŭstra laborinspekto eldonis 28-paĝan bazan informdokumenton titolita « Organizado, rajtoj kaj devoj » germanlingve kaj en Esperanto. La dokumento estas konsultebla ĉe: http://www.arbeitsinspektion.gv.at/NR/rdonlyres/56825F26-6ACD-4E72-B8D9-73D47BD9044B/0/arbig_esperanto.pdf

aŭ mendebla ĉe la eldoninto: Bundesministerium für Wirtschaft und Arbeit, Sektion Arbeitsrecht und Arbeitsinspektion, Favoritenstraße 7, A-1040 Wien

Ĵus ekfunkciis ASELT (Asocio Sennacieca de Esperantistoj- Laboristoj en Togolando). Ĝi estas la unua asocio de Esperantistoj-Laboristoj en Afriko.

Per ASELT Esperantistoj laborantaj en Togolando celas:

- viviĝi veran solidaron inter Esperantistoj laborantaj en Togolando
- disvastigi Esperanton per propraj rimedoj.

Speciala jarkunveno de SATEB okazos en Londono la 19an de majo 2007, posttagmeze, post matena prelego de Jakvo Schram pri « Klasbatalo mia amiko, klasbatalo mia malamiko ». La ĉefa temo de la kunveno estos la tuja estonteco de SATEB: ĉu dormigi ĝin, ĉu krei angalingvan perretan LEA-on?

Pliaj informoj haveblaj ĉe: Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, BRENTWOOD, Essex CM13 1EJ Tel: +44 (0)1277 228962 <arturo@signalprent.demon.co.uk>

Jakvo Schram ankaŭ prelegos la 18-an de majo ĉe la londona klubo pri la temo « Ĉu Iu Sennacieca Tutmonda Asocio Necesas? ».

V.M.